

EsperantoLand-novaĵoj

Novembro 2013

([deutsch](#))

- [12-a Novjara Renkontiĝo en Saarbrücken, kun la 5-a Novjara Internacia Semajno \(NIS\) por junuloj, 27-a de decembro 2013 ĝis 3-a de januaro 2014](#)
 - [5-a PRINTEMPE en Marienburg/Mozelo, pasko 2014 \(14-a ĝis 21-a de aprilo\)](#)
 - [MARO, Mara Renkontiĝo, apud Mediteraneo, pentekosto 2014 \(ĉ. 31-a de majo ĝis 14-a de julio\)](#)
 - [12-a SOMERE en Dahlem-Baasem, dusemajna, 23-a de julio ĝis 6-a de aŭgusto 2014](#)
 - [Eble: Vojaĝo en Maroko, ĉ. oktobro 2014](#)
 - [Libroj ĉe EsperantoLand](#)
 - [Raportoj pri FESTO \(en Kelmis apud Akeno\) en gazetoj kaj televido](#)
 - [Amaskomunikilaj rilatoj - kial gravas, kiel fari?](#)
 - [Duolingo, retejo por lingvolernado, tradukota al Esperanto](#)
 - [Hermann Behrmann, 1935 - 2013](#)
-

Komune festi la Novan Jaron - en Saarbrücken, apud la franc-germana landlimo

Intertempe aliĝis pli ol cento da homoj al la ĉi-jarfina 12-a Novjara Renkontiĝo (NR) kaj la 5-a Novjara Internacia Semajno (NIS), la programo por junuloj en NR. Ĉi-jarfine okazos en Saarbrücken, apud la franc-germana landlimo. Estas facile atingi Saarbrücken el Francio - el Parizo trajnoj bezonas malpli ol du horojn. Sed ankaŭ el Belgio, Nederlando kaj Svislando la loko atingeblas kutime en duona tago.

Por junuloj: Novjara Internacia Semajno (NIS)

Pli kaj pli establiĝas tiu aranĝo por junuloj kaj junaj plenkreskuloj, kiuj kreas kaj ĝuas sian apartan programon kaj senprograman kunestadon. Ĉu ankaŭ vi ŝatos kunveni kun aliaj junuloj proksime de la franc-germana landlimo?

Cento da programaj ofertoj

Ankaŭ ĉi-jare Novjara Renkontiĝo ofertas multfacetan programon - kun supozeble denove cento da diversaj ofertoj. Vespere okazos interalie koncertoj, kvizo, luda vespero kaj silvestra balo. Dumtage estos dekoj da prelegoj kaj laborrondoj por plenkreskuloj, junuloj kaj speciala programo por infanoj.

Lerni Esperanton en EsperantoLando

Ankaŭ ĉi-foje estos lingvaj kursoj por komencantoj kaj progresantoj kaj konversacia rondo - por subteni la lingvo-lernadon en EsperantoLando. Tiel eblas lerni kaj plulerni Esperanton kaj ĝui internacian renkontiĝon.

Kiu jam aliĝis?

Jen listo de ĝisnunaj aliĝintoj al NR, http://esperantoland.de/nr/partoprenantoj_nr12.php kaj al NIS http://esperantoland.de/nis/partoprenantoj_nis5.php .

Se vi havas demandojn, volonte ni respondos. Jen la informpaĝoj, <http://www.esperantoland.org/nr> kaj <http://www.esperantoland.org/nis>

Renkontiĝi super la valo de Mozelo dum pasko

Jam kelkfoje ni pasigis belajn Esperanto-renkontiĝojn en Marienburg, kunvenejo sur monteto kun ambaŭflanka rigardo al Mozelo. Tie okazos ankaŭ la venonta, 5-a PRINTEMPE, dum la semajno de la 14-a ĝis la 21-a de aprilo 2014 (lundo ĝis lundo; la 20-a de aprilo estos la paska dimanĉo).

Okazos kelkaj prelegoj, promenoj kaj ekskursoj en la regionon. Krome ni ĝuos la agrablan gastigon en la plaĉa kunvenejo.

[Venu ĝui la printempon super la mozela valo :-\)](#)

MARO, Mara Renkontiĝo, apud Mediteraneo, ĉirkaŭ pentekosto 2014

Malgranda Esperanto-renkontiĝo okazos dum la du semajnoj ĉirkaŭ pentekosto en suda Francio, sur la duoninsulo de St. Tropez (ĉ. 31-a de majo ĝis 14-a de junio). Ni loĝos en privata feria domo kun bela teraso kaj granda ĝardeno, 800 metrojn de la "blua marbordo".

Se logas vin la ideo dum unu aŭ du semajnoj ĝui feriadon apud la mediteranea maro en Esperanto-etoso, [anonciĝu](#).

12-a SOMERE en Dahlem-Baasem, dusemajna, 23-a de julio ĝis 6-a de aŭgusto 2014

La venontjara Somera Mezeŭropa Renkontiĝo (SOMERE) estas planata dum la du semajnoj de la 23-a de julio ĝis 6-a de aŭgusto 2014 (merkredo ĝis merkredo). Ni volas reiri al la agrabla kunvenejo en Dahlem-Baasem, kun endoma naĝejo kaj bela rigardo super la valon. Estos kiel kutime kelkaj prelegoj, promenoj kaj ekskursoj en la regionon.

[Ĉu vi ŝatos somerumi kun ni?](#)

Vojaĝo en Maroko, ĉ. oktobro 2014

Ekestis la ideo fari vojaĝon al Maroko, dum unu aŭ du semajnoj proksimume en oktobro 2014. Unua plano (por unu semajno) estas alteriĝi en Tanĝero, viziti la urbon, la apudajn lokojn Asilah kaj Chefchaouen por fini la vojaĝon en Rabat, <http://goo.gl/maps/TX7JS> . Iom da vojaĝado, sed ankaŭ iom da pli trankvila restado kaj promenado. Eble iam ni prezentu publikajn informprelegojn pri Esperanto okaze de la vojaĝo.

Ĝis nun tio estas nur unua skizo, kiu ŝanĝeblas laŭ la deziroj de interesitoj kaj la daŭro de la vojaĝo. Ĉu vi jam estis en Maroko? Ĉu interesus vin?

[Do kontaktu nin kaj komuniku viajn ideojn pri la vojaĝo.](#)

Libroj ĉe EsperantoLand

Fine de la sesdekaj jaroj la ĉi-junie bedaŭrinde mortinta Hermann Behrmann (Hermano Bermano) verkis la lernolibron "Esperanto programita", kiun li sukcese surmerkatis. Li bone prizorgis la

lernintojn ankaŭ post la lernado, kadre de la asocio Esperanto-Centro (Paderborn), interalie per libroservo. En 2003 la asocio kuniĝis kun la laborgrupo "EsperantoLand", kies nomon ĝi transprenis; Lu Wunsch-Rolshoven transprenis la prezidantecon de la asocio; la libroservo restis aktiva.

Nia libroservo plu ofertas librojn, ĉefe eldonitajn antaŭ deko da jaroj aŭ pli. Multaj el ili tamen plu estas interesaj verkoj, ekzemple:

- [El la "Verda Biblio"](#), de Izrael Lejzerowicz.
Klasika satiraĵo pri la verda lingvo kaj ties popolo. Prezo: 4,50 €
- [La muzino](#). De Rikardo Ŝulco.
Granda kolekto de poezio originala kaj tradukita. Prezo: 19 €
- [Gudrun](#). De Johannes Vilhelm Jensen.
Klasika amromano de la nobelpremiito; pri juna danino. Prezo: 7,50 €
- [Mediterranea breviero](#). De Predrag Metvejević.
"La verkisto intencas kompreni Mediteraneon, estas ravita pri ĝi, sed li ankaŭ klopodas precize difini signifojn, fiksi limojn" (C. Magris). Prezo: 15 €
- [El verva vivo ĵurnalista](#), de Stefan Maul.
La fondinto kaj multjara ĉefredaktoro de "Monato" rakontas el sia vivo. Prezo: 20 €
- [La kosmo kaj ni](#). Galaksioj, planedoj kaj vivo en la universo. De David Galadí-Enríquez kaj Amri Wandel.
Unuafoje en Esperanto, kompleta manlibro pri teoria kaj praktika astronomio. Prezo: 17 €

(Ekzistas nur limigita kvanto de tiuj libroj - ni do petas pardonon, kaze ke iuj libroj elĉerpiĝos. - Pro vojaĝo ni forsendos la librojn laŭ via mendo ekde venonta merkredo, 5-a de novembro.)

Eble ĵetu rigardon al nia [oferto laŭ rubrikoj](#) aŭ al la [kompleta listo](#). Se vi interesiĝas pri iu libro, sed dezirus havi pli favoran prezon, ni ĝojos pri via oferta. (Kaj se kontraste vi ŝatos donaci al ni, ni kompreneble ankaŭ tre ĝojos... :-)

([Sube plu en Esperanto](#))

Internationales Neujahrstreffen von EsperantoLand in Saarbrücken

Ende des Jahres findet für eine Woche das 12. Internationale Neujahrstreffen von EsperantoLand statt, vom 27. Dezember 2013 bis zum 3. Januar 2014. Bisher haben sich 115 Teilnehmer angemeldet, etwa 150 bis 180 werden daran teilnehmen.

Esperanto lernen in EsperantoLand

Im Programm sind auch Sprachkurse für Anfänger und Fortgeschrittene sowie Konversation. So kann man gleichzeitig Esperanto lernen und es schon ein wenig anwenden.

Reichhaltiges Programm: Konzerte, Vorträge, Ausflüge...

Im Programm sind etwa hundert verschiedene Angebote - unter anderem Konzerte, Theater, Spaziergänge, Ausflüge...

Interesse? Einfach auf diese Mail antworten... Oder auf

http://www.esperantoland.org/nr/index_de.shtml#alighilo mehr Informationen anfordern.

Raportoj pri FESTO (en Kelmis apud Akeno) en gazetoj kaj televido

En Kelmis okazis meze de aŭgusto ĉi-jare la junulara kaj muzika renkontiĝo FESTO, kun pli ol cent partoprenantoj el dudeko da landoj kaj kun deko da koncertoj; organizanto estas la franca Esperanto-Junularo kun helpantoj el multaj landoj. Pri FESTO aperis raportoj en la belga (germanlingva) gazeto Grenz-Echo, en la Akenaj gazetoj Aachener Nachrichten kaj Aachener Zeitung. Krome la regiona televido raportis sabatvespere dum iom pli ol minuto. Pri la tri lastaj publikigoj zorgis Lu Wunsch-Rolshoven, prezidanto de EsperantoLand.

[Aachener Nachrichten](#) kaj (sama teksto) [Aachener Zeitung](#)

(La raporto ĉe la televido WDR en "Lokalzeit Aachen" bedaŭrinde ne plu haveblas rete.)

Amaskomunikilaj rilatoj - kial gravas, kiel fari?

Amaskomunikilaj rilatoj, do la klopodado atingi publikigojn en gazetoj, radio, televido kaj interretaj publikaĵoj, estas bona bazo por la strebado konigi Esperanton kaj ĝian hodiaŭan aplikadon.

Amaskomunikiloj gravas, ĉar tiaj raportoj estas ofte la unua loko por la inform-serĉado de aliaj ĵurnalistoj kaj de interesitoj; bonaj artikoloj multe helpas eviti postajn malbonajn raportojn pro tiu antaŭa informiĝo. Krome amaskomunikilaj rilatoj estas tre efika rimedo de informado: Por ĉiu unuopa kontakto kun homo el la publiko ĉe amaskomunikilaj rilatoj oni bezonas po nur kelkajn sekundojn de laboro - afiŝoj, informiloj ktp. konsumas multege pli da tempo.

Ĉefe gravas intense gazetari pri renkontiĝoj plej diversaj (tio bedaŭrinde ofte mankas, multaj organizantoj ŝajne ne trovas la tempon por tio, eble taksas ĝin malgrava, eble ne scias kiel fari kaj ne serĉas iun, kiu pretas kaj kapablas fari). Gravegas ĉe tio ripeta alparolado ankaŭ de ĵurnalistoj - mi (Lu Wunsch-Rolshoven) eble tial ŝajne pli ofte sukcesas ol aliaj, ĉar mi unue altelefonas la tri ĝis kvin plej gravajn amaskomunikilojn de la regiono por baze informi kaj ekscii la plej bonan retpoŝtan adreson, poste reŝendas al ili skriban tekston, poste retelefonas, ĉu ili bone ricevis kaj eble ŝatus havi pliajn informojn - kaj eble fine altelefonas dum la renkontiĝo, ĉu ili eble ŝatos veni... Eble tio estas mia kerna "sekreto" pri ĉi-rilata sukceso - iom intense klopodi... Tion mi faras, ĉar laŭ mi ja vere gravas amaskomunikilaj rilatoj - por atingi nian celon de Esperanto-disvastigo kaj ankaŭ por permesi al aliaj civitanoj bone informiĝi pri Esperanto kaj tiel havi la ŝancon decidi, ĉu ili ŝatos lerni nian lingvon.

"Esperanto estas ĉiam bonvena - nur **oni ne parolu pri tio, ke Esperanto fariĝu tutmonda lingvo.**" Tion spontanee diris al mi amiko, kiu sukcesis trifoje dum sia studado prezenti prelegon pri Esperanto en seminarioj (mi demandis al li, kiel li sukcesis pri tio). Ankaŭ en la komunikado kun la gazetaro: Se oni alparolas la temon de tutmonda disvastiĝo, oni facile aspektas kiel iluziulo kaj oni estigas negativajn rimarkojn kiel "ili ankoraŭ revas pri...", "sed evidente tio malsukcesis". (Se oni iam volis fariĝi ekzemple ĉefo de organizaĵo, oni aspektas pli pozitive, se oni ne mencias tion; prefere oni diru nur, ke oni ja atingis tri ŝtupojn de la hierarkia ŝtupetaro kaj ke horizonte videblas la kvara...)

Ĉiukaze mi sugestas okupiĝi pri amaskomunikilaj rilatoj, se vi ŝatos tion - kaj mi volonte helpos per konsilado kaj eble ankaŭ per verkado de tekstoj kaj estigo de kontaktoj kun ĵurnalistoj. (Lu Wunsch-Rolshoven)

Duolingo, retejo por lingvolernado, eble tradukota al Esperanto

Ekde du jaroj la retejo duolingo.com ofertas lingvolernadon, aktuale la lingvojn franca, itala, hispana, portugala kaj germana (kun la angla kiel instrulingvo) kaj krome la angla kiel lernata lingvo kun la nomitaj lingvoj kiel instrulingvoj. Ne ekzistas pli longaj lecionaj tekstoj kaj apenaŭ gramatikaj klarigoj - la lernado funkcias kiel sinsekvo de etaj ekzercoj; ĉefe tradukado, kelkfoje

skribado de diktita frazo aŭ elekto de eblaj tradukoj. Estas multaj ludecaj eroj en tio - vi gajnas poentojn por la ekzercoj, rajtas fari maksimume kvar aŭ kvin erarojn en grupo de dudek ekzercoj, konkurencas kun viaj amikoj kaj konatoj...

Kvankam kelkfoje la frazoj ne estas tute naturaj aŭ oni lernas komence vortojn, kiuj ne tro gravas, tamen estas por multaj homoj amuze trairi la lecionojn. Tute certe oni ja lernas novajn vortojn kaj frazostukturojn kaj oni adaptiĝas al parolata lingvo, kiun oni daŭre aŭdas.

Traduki la interreton

Post iom da tempo oni ofertas al la uzanto traduki realajn tekstojn el la interreto aŭ prijuĝi alies tradukojn. Kaj tie kuŝas la fina celo de la retejo Duolingo - estas la ideo tradukigi grandan parton de la interreto uzante amason da libervolaj tradukantoj, kiuj kompanse por sia laboro plulernas fremdan lingvon. La sistemo ne blinde fidas unu solan tradukanton, sed ja la komunan opinion de deko da ili. Tiu vizio de grandkvanta disponigo de la scio de la mondo en multaj lingvoj do signifas kontribui al la rompadado de lingvaj muroj - simile kiel Esperanto, sed laŭ alia vojo, eble iom pli multlabora...

Ĉu en Esperanto?

En oktobro Duolingo anoncis, ke ili vastigos la oferton - en la nun sekvanta ŝtupo oni enkondukos pli da instrulingvoj por la sama seso da lerneblaj lingvoj. Inter la dudeko da eblaj instrulingvoj troviĝas ankaŭ Esperanto. Se vi do volas kunlabori en la kreiĝo de esperantlingvaj kursoj por kelkaj lingvoj, eble vizitu la koncernan [paĝon por kunlaborantoj](#).

Duolingo anoncis, ke pli poste ĉi-jare ili komencos oferti ankaŭ la lernadon de pliaj lingvoj, do ĉe la tradukoj la inversa direkto; supozeble en tio ili uzos la materialon kreitan en la nuna fazo. Kaj, ĉiukaze, estos certe bona progreso por Esperanto, se oni ne nur povos lerni la lingvon ekde multaj naciaj lingvoj, sed se same naciajn lingvojn oni povos lerni pere de Esperanto, interrete kaj senkoste.

Jen la [Laborgrupo por Duolingvo en Esperanto ĉe Facebook](#).

Hermann Behrmann, 1935 - 2013

La 29-an de junio mortis Hermano Bermano (Hermann Behrmann). Dum la sepdekaj jaroj li fondis en Paderborno la asocion Esperanto-Centro, kiu ekde 2003 portas la nomon EsperantoLand; li prezidis la asocion dum pli ol du jardekoj kaj ĝis sia morto estis ties vicprezidanto.

Fine de la sesdekaj jaroj li verkis la lernolibron "Esperanto programita", kiu longe furoris en Germanio dank' al lia bona varbado; iutempe ĉiuj estraranoj de Germana Esperanto-Junularo (GEJ) estis lernintaj surbaze de tiu lernilo. Li eldonis la Specialan Cirkuleron por lernintoj kaj amikoj de Esperanto, organizis regionajn kunvenojn por ili kaj fondis internacian libroservon kaj abonservon. Dum multaj jaroj li aranĝis grupvojaĝojn al Universalaj Kongresoj kaj aliaj renkontiĝoj.

Aldone al la serio de "Esperanto Programita" kun kvar kajeroj kaj sonmaterialo Bermano eldonis plurajn dekojn da libroj, el kiuj multaj estis verkitaj aŭ tradukitaj de Rikardo Ŝulco (Richard Schulz), ĉefaganto de la Analiza Skolo. Kelkajn pliajn librojn Bermano mem verkis aŭ kunverkis. "Esperanto programita" estis tradukita interalie en la nederlandan, anglan kaj portugalan kaj ĝia stilo servis kiel inspiro por la lernokajeroj "Esperanto - Schritt für Schritt" de GEJ (paŝo post paŝo).

Per sia multflanka agado por la popularigo kaj lernado de Esperanto Hermano Bermano metis la bazon por la kresko de la Germana Esperanto-Junularo dum la sepdekaj kaj okdekaj jaroj. En la ejo de Esperanto-Centro en Paderborno Hermano dum pluraj jaroj gastigis la oficejon de GEJ kaj ties

laborsemajnfinojn. En 1995 Germana Esperanto-Asocio agnoskis liajn atingojn per meritmedalo de GEA.

Profesie Hermano Bermano estis instruisto en bazlernejo. Post la pensiigo li translokiĝis al Berlino kaj dum la lastaj jaroj loĝis en Dresdeno.

Hermano Bermano havas grandajn meritojn por la evoluigo de la germana kaj internacia Esperanto-komunumo. La asocio, kiun li fondis kaj poste prezidis dum pluraj jardekoj, Esperanto-Centro/EsperantoLand, honore memoros lin kaj lian laboregon.

Pliaj informoj en la [vikipedio](#).

Respondilo pri renkontiĝoj kaj vojaĝoj

(Metu X-ojn aŭ enskribu informon; kaj resendu al ni)

Mi interesiĝas pri la jenaj ofertoj de EsperantoLand

- NR 2013/14
- NIS (la porjunulara parto de NR)
- PRINTEMPE 2014
- MARO 2014
- SOMERE 2014
- Vojaĝo al Maroko

Rimarkoj: _____

Nomo:

Retpoŝta adreso:

--

EsperantoLand
Internaciaj ferioj
www.esperantoland.org

Novjara Renkontiĝo (NR)
Novjara Internacia Semajno (NIS)
PRINTEMPE
SOMERE

Se vi deziras ne plu ricevi informojn de ni (aŭ nur specialajn), bv. indiki tion al ni per simpla respondo al ĉi tiu rondletero. Aŭ uzu <http://www.esperantoland.org/eo/kontakto.html>